



BOLETIN

DE LA FEDERACION ESPAÑOLA
DE ESPERANTO

AÑO XXII - Nº 262

Marzo-Abril 1984

44a HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO Seviljo, 1984, 7-12 julio



Kun la celo diskonigi tra la Mondo, la nunjaran Kongreson,
oni eldonis ĉi tiun belan bildkarton.

BOLETIN DE LA FEDERACION ESPAÑOLA DE ESPERANTO

Directora: María Aurora Viloria

DIRECCION Y ADMINISTRACION

Apartado 119 - VALLADOLID

REDACTOR JEFE

Salvador Aragay Galbany
Bassegoda, 40
Tfno: (93) 3338081
BARCELONA-28

COMITE DE REDACCION

Giordano Moya
Vicente Hernández Llusera
Gabriel Mora i Arana
Luis Serrano Pérez
Miguel Gutiérrez Adúriz
Andrés Martín González

ENHAVO

	Paĝo
Iom pri nia nunjara Kongresurbo	3
Estado de Cuentas del 43 Congreso	
Nacional	5
Kroniko de Grava Evento	7
Niaj Grupoj	8
Estado de Cuentas de Libro-servo	
de H.E.F.	9
Kampanjo E-100	9
Sincereco, pleje	10
En 1992, cu Olimpikoj en Barcelono?	12
Palindromoj	13
Pri iuj verboj	13
La Kavaliroj el Blank	14
Modificaciones al Directorio	17
24aj Internaciaj Floraj Ludoj	19
La plej vendata Esperanto-Libro	19
Nova Esperantistino	19
Internaciaj Kongresoj kaj Kunvenoj	20
Recenzoj, Recenzoj, Recenzoj	21
Vankuvero atendas vin	22
Deziras Korespondi	23
Sulko	23
Universala Esperanto-Asocio	23

INFORMA FAKO

Enrique Palacios Vázquez
Asin y Palacios, 8, 6º A
ZARAGOZA-9

UTILAJ ADRESOJ

HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO
Apartado 119
VALLADOLID

Prezidantino

María Rafaela Urueña Alvarez
Avda. Ramón y Cajal, 12, 2º C
Tfno: (983) 260086
VALLADOLID-11

Sekretario

Luis Hernández García
Adreso kiel supre

Kasistino

Carmen Conde Labajo
Calixto Valverde, 8, 8º A
VALLADOLID-14

Pagojn sendu al nia Konto
Nº 001.664-0
Caja de Ahorros Popular
Ag. Urbana 6
Avda. Vicente Mortes
VALLADOLID

Libroservanto de H. E. F.

José González Suárez
Apartado 119
VALLADOLID

Pagoj por libro-servo sendu al unu el la
jenaj kontoj:

Cuenta Postal 3.118.078

Caja de Ahorros Popular
Oficina Central
Cta. Nº 042.268-4 a nombre de
LIBRO-SERVO DE LA FEDERACION
ESPAÑOLA DE ESPERANTO
VALLADOLID

ELDONA FAKO

Inés Gastón
Pº de la Constitución, 35, 4º
ZARAGOZA-1


ĈEFDELEGITO DE U. E. A.

Juan Azcuénaga Vierna
Gral. Dávila, 127, portal 7, 2º lz.
Tfno: (942) 339487
C. Postal: 03548531
SANTANDER

H. E. J. S.

Atocha, 98, 4º
Tfno: (91) 2308798
MADRID-12

IOM PRI NIA NUNJARA KONGRESURBO



Interno de la Alkazaro.

Sevilo estis konata en la roma epoko sub la nomo «Hispalis», ĝi estis roma kolonio ekde la jaro 45-a a.k. Ĉefa urbo de la Betica lando, ĝi estis ankaŭ jura monahejo kaj havis aktivan komercadon kun Romo. Ĝi estis, siavice, konkerita de la vandoj, suevoj kaj visigotoj, en la 5-a jarcento. Dum la regado de la visigotoj, Sevilo estis centro de religiaj luktoj kaj grava fokuso kultura.

Okupite de la araboj en la jaro 712-a, la urbo perdis parton de sia vigleco. Post la falo de la kalifa regno, en la jaro 1031-a Sevilo fariĝis la registara urbo de sendependa tajfo (1). La almoravidoj (2) konkeris la regnon de Sevilo en la jaro 1091-a, kaj en la jaro 1147-a la almohadoj (3) fariĝis la mastroj de la urbo. Fernando la 3-a helpate de la armeo de Ramón Bonifáz, rekonke-

ris la urbon en la jaro 1248-a kaj ĝi estis popolita, post la kompleta forigo de la muzulmanaj, kastiliaj, genovaj, katalunaj kaj judaj gentoj. La genovanoj luktante kontraŭ la katalunoj por la komerca kontrolo de la lano atingis specialan statuton en la jaro 1251-a.

Sevilo komencis sian ekspansian epokon post la malkovro de Ameriko kaj la instalo de la «Domo de la Kontraktado» en la jaro 1503-a, kiu monopolis la komercon kun Ameriko kaj organizadis la koloniajn ekspediciojn.

Tra Sevilo alvenadis al Hispanujo la amerikaj produktoj, speciale la oro el Peruo kaj la arĝento el Potosí, samtempe ankaŭ centriĝis en Sevilo ĉiuj produktoj destinitaj al la Nova Mondo. Stimulate de la komercado,

Sevilo fariĝis la urbo plej loĝata de la lando.

La apogeo ekonomia malpliigis en la 17-a jarcento, pro la generala dekadenco de Hispanujo. Tiu procezo kulminis en la 18-a jarcento pro la translokiĝo de la «Domo de la Kontraktado» al Kadizo en la jaro 1717-a, kaj kun la establiĝo de la libera komerco kun Ameriko en la jaro 1778-a.

Fernando la 7-a translokis al Sevilo la registaron kaj la parlamenton dum la invado de la francaj trupoj en la jaro 1823-a. En Sevilo malvolviĝis la plej gravaj epizodoj de la politikaj luktoj de la 19-a jarcento. Kiam proklamiĝis la Respubliko, Sevilo sin deklaris sendependa kantono en la jaro 1873-a, post malmultaj monatoj la urbo estis konkerita de generalo Pavía.

La andaluzia anarkismo havis unu el siaj plej gravaj centroj en Sevilo, dum la 19-a jarcentoj kaj unuaj jardekoj de la nuna.

Je la komenco de la hispana civila milito en la jaro 1936-a, Sevilo estis okupita de generalo Queipo de Llano kaj ĝi fariĝis la organiza centro por la trupoj de la registraro de Burgos en ĉi tiu zono.

TRAKTATO DE SEVILO.—La Traktato estis subskribita de Hispanujo, Francujo kaj Anglujo, per kiu Hispanujo alcedis la sistemon de eŭropa ekvilibro, defendita de Fran-

cujo kaj Anglujo, la 19-an de novembro 1729-a. Kompense, Hispanujo havigis por la unua naskito de Isabel Farnesio, la estonta reĝo Karolo la 3-a, la duklandojn de Parma kaj Plasencia, post malmulta tempo ankaŭ Nederlando aliĝis al ĉi tiu traktato.

ARTO. Sevilo estis urbo de iberia origino (Hispalis), ĝi estis konkerita de la fenicioj, grekoj, kartaganoj kaj romanoj. Dum la regado muzulmana, Sevilo estis tre grava arta centro, inter la jaroj 712-a kaj 1248-a, kaj ankoraŭ konserviĝas la muregoj de la almoravidoj kun defendturoj, la nomata Blanka Turo kaj tiu de la Arĝento, konstruita dum la kristana epoko. La Turo de la Oro, konstruita ĉirkaŭ la jaro 1220-a konsistas el dekduangula planko, kun tri partoj, la lasta konstruita dum la 18-a jarcento. La Alkazaro de Sevilo estis starigita de la almohadoj kaj poste reformita de Petro la 1-a, la Katolikaj Reĝoj, Karolo la 5-a kaj Elizabeto la 2-a.

La korto de la «Monteria» (Ĉasado) estas specimento plej karakteriza de la hispana arto mudehara(4). La Palaco de la Reĝo Don Pedro konsistas el du blokoj de konstruaĵoj situantaj ĉirkaŭ du kortoj, nome tiu de la «Fraŭlinoj» kaj tiu de la «Pupoj», proksime al la unua korto troviĝas la salono de la Ambasadoroj, kiu estas kovrita per kupoloj duonsferaj kun mokrabo(5). Krome estas menciin-

NOTOJ

1. Tajfo: Malgrandaj regnoj, kiuj formiĝis post la falo de la granda Kaliflando
2. Almoravidoj: membroj de muzulmana sekto, kreita de Ibn Yasin, inter la jaroj 1.056-a kaj 1.147-a
3. Almohadoj: Islama komunumo, inter la jaroj 1.121-a kaj 1.269-a, formita de Ibn Tumart
4. Mudehara: arto de la araboj submetitaj de la kristanoj, nomita tiumaniere de Amador de los Ríos
5. Mokrabo: Ornama elemento de la araba arkitekturo de la 11-a jarcento, ĝi konsistas el prismo kurbe tranĉita en la suba parto.

da la Salono de la Justico, 14-a jarcento, konstruaĵo de kvadrata planko, la ĉambro de la Admiralo, la saloneto de la Juĝpalaco, kovrita per riĉa kasonaro de la 17-a jarcento, la ĝardeno de la Danco kaj la korto de la Flagoj.

La Katedralo komencita en la 14-a jarcento kaj finita je la fino de la 16-a estis konstruita sur loko de antikva moskeo, el kiu ankoraŭ konserviĝas la korto de la Oranĝarboj

kaj la «Giralda». Sekve de la Granda Kapelo, oni aldonis poste la Reĝan Kapelon, de stilo platereska kaj konstruita de Marin Gainza. Proksime de la Katedralo troviĝas la Palaco de la Arkiepiskopoj, de baroka stilo. La «Lonja» (fiŝa vendohalo) konstruita de Juan Herrera, estas daŭrigo de la modelo de la «Escorial» en ĝi nuntempe troviĝas la Arkivo Ĝenerala de la Indioj.

Luis Serrano Pérez

ESTADO DE CUENTAS DEL 43 CONGRESO NACIONAL DE ESPERANTO

INGRESOS

Cotizaciones de congresistas	235.605	pts.
Recibido para reservas de hotel	110.524	"
Recibido en concepto de donativos	25.558	"
Venta de postales y pegatinas	16.651	"
Cobrado por banquete y excursión	263.500	"
Donativo de Jaime Benito	40.760	"
Subvención de CAZAR	750.000	"
Subvención Diputación General de Aragón	50.000	"
Subvención Diputación Provincial de Zaragoza	150.000	"
Subvención Excmo. Ayuntamiento de Zaragoza	50.000	"
Suma	1.692.598	

GASTOS

Alquiler salones Palacio Exposiciones y Congresos	750.000	pts.
Pagada reserva hoteles y pensiones	114.019	"
Pagado excursión, restaurantes, «Interkona Vespero»	307.694	"
Canon Teatro de la Feria de Muestras	33.000	"
Pagado a pintores por pancartas	60.493	"
Donativo al Grupo Folklórico «Baluarte Aragónés»	50.000	"
Varias facturas de imprenta	274.479	"
Pagado a Correos por oficina y matasellos	21.566	"
Franqueo circulares, correspondencia y folletos	20.803	"
Fotocopias, circulares, revista juvenil, carpetas	59.552	"
Portes exposición y gratificaciones	30.118	"
Suma	1.674.724	

RESUMEN

Ingresos	1.629.598
Gastos	1.674.724
Saldo ...	17.874

KRONIKO DE GRAVA EVENTO



Prof. Zaragoza, Vicsekretario de I.L.E.I. kaj Estrarano de H.E.F. alparolas dum la inaŭguro de la strato «Calle del Idioma Esperanto» en Callosa de Segura. Akompanas lin la urbestro Moŝta s-ro José Pascual Gómez kaj la skabenoj pri Edukado, s-ro Rodríguez kaj pri Kulturo, s-ro Berná.

Kun granda plezuro, brilo kaj ne mapli da entuziasmo oni solenis la programitajn agojn por memorfesti la 50-an datrevenon de la fondado de la Esperanta Societo «Ĉiam Esperanto», en nia urbo, Callosa de Segura-Alicante.

Malmultaj estas la postvivantoj de tiu malproksima epoko; inter ili, ni povas menciigi s-rojn Zaragoza Ruiz, J. Valdés, F. Valdés, B. Sánchez, López Serna, Bernabeu Franco, Bru Mateo kaj kelkaj pli. Tamen, tiuj ĉi malmultaj sufiĉis por ke la flamo de Esperanto ne estingiĝu, kaj ĉiariske la Verda Stelo, simbolo de Esperanto, restu ĉiam elstara.

La agado komenciĝis la 15-an de decembro pasintjare, per tre abunda Ekspozicio de diversa materialo rilatanta al Esperanto. Tie ni povis vidi literaturajn verkojn, didaktikajn librojn, vortarojn, afiŝojn, gazetojn, revuojn, k. s. de la tuta mondo. Elstaris la traduko en Esperanto de la senmorta verko de Cervantes «Don Kihoto», tre meritinda laboro de nia eminenta esperantisto s-ro Fernando de Diego. Sekve, la instruisto de la Perfekta Kurso de Esperanto, s-ro José María Bernabeu Franco, prelegis pri la temo «De Esperanto

al aŭtentika kunlaborado de la popoloj», kiun aŭskultis atente la ĉeestantoj, precipe kiam li rakontis anekdotojn pri sia ĉeestado en internaciaj kongresoj. Lia prelego estis tre aplaŭdita. Tiuj ĉi agoj okazis en la salono de la Ŝparkaso de Alicante kaj Murcio cedita ĝentile por tiuj ĉi aranĝoj.

La 16-an oni projekciis filmon en Esperanto pri turismaj aspektoj de kelkaj nordeŭropeaj urboj, tre ŝatata de la ĉeestantoj.

La 17-an okazis du prelegoj. Unue, prelegis la juna licenciulo pri Psikologio, s-ro Javier Corbalan Berna, pri la temo «Esperanto en la internaciaj instancoj», prelego premiita per varma aplaŭdado. Due, prelegis la instruisto F. Zaragoza Ruiz Vicsekretario de I.L.E.I., pri «Kial Esperanto en la ĝenerala baza edukado?», prelego tre dokumentita kiu konvinkis la aŭdantaro pri la bezono de internacia lingvo, kies scio devus komenĉi en la elementaj lernejoj. Sekve la ĉeestantoj faris al li plurajn demandojn pri la temo, tuj responditajn de s-ro Zaragoza tre trafe. Granda aplaŭdo fermis la prelegon de s-ro Zaragoza, al kiu tre merite ni povas aljuĝi la titolon de aŭtentika apostolo de Es-

peranto, pro la grandaj streboj por la devastigo de nia kara lingvo.

Fine, la 18-an, dimanĉe, la esperanta ĉeestantaro pliiĝis agrable, ĉar alvenis reprezentantoj de esperantaj grupoj el Valencio, Alicante, Murcia, Cartagena kaj el pluraj urboj de la provinco, inter ili Novelda, Elda, Alcoy, k.s.

Tiu ĉi tago estis kiel ora finaĵa broĉo de l'evento. Je la 10-a matene la teamoj «C.B. Esperanto» kaj «C.B. Callosa» ludis korbopilkon. La kaptano de la venkinta «C. B. Callosa» ricevis trofeon de la Urbestra Moŝto, s-ro José Pascual Gómez Rodríguez kaj ankaŭ ĉiuj ludantoj ricevis allogajn premiojn post la sportado.

Je la 11-a okazis eble la plej kortuŝa ero de la Memortago. Estis la momento de la malkovro de memorplato kun la nomo de «Calle del Idioma Esperanto», al nova strato apud la Publika Ĝardeno, moderna, bela kaj bone zorgata, de nia Urbestra Moŝto, kune kun la Delegito-Skabeno pri Kulturo, s-ro Berna Cascales. Varmaj aplaŭdoj subskribis la malkovron de la plato, kaj ĉiuj esprimis ĝojon, ĉar Callosa havas straton dediĉitan al nia kara lingvo.

Sekve, la ĉeestantoj iris al la Solena Salono de la C.A.A.M. kie okazis firmiga esperanta aranĝo. La diversaj delegitoj eldiris salutvortojn kaj elstaris la paroladeto de s-ano Antonio Serna, Profesoro pri Kemio-Fiziko en la Universitato de Murcia, kiu reliefigis kaj substrekis la neceson de internacia lingvo en la tuta mondo, pro la grandegaj malfacilaĵoj kaj multenombraj elspezoj produktitaj de la diversaj lingvoj.

Poste, ni vizitis nian parokan preĝejon Sankta Martino, nacia historia monumento, vizito kiu placis multe al niaj samideanoj, mirigitaj de la beleco kaj grandiozezo de nia preskaŭ katedrala preĝejo.

Tuj poste oni aranĝis fratan bandedon en la manĝosalono de la Publika Kolegio «Primo de Rivera». Dum la postmanĝado, nia loka tenorulo Manuel Navarro kantis tre majstre plurajn kanzonojn en Esperanto, inter ili la mondfaman Granada de la meksika komponisto Agustín Lara. Same, la juna universitata studento kaj elstara lernanto de la Muzika Konservatorio de Alicante, Gitara Fako, nia samvilaĝano José Pascual Pina Rives, ludis kun granda majstreco kelkajn komponaĵojn. Ambaŭ estis tre aplaŭditaj. Ankaŭ niaj junaj esperantistoj kantis plurajn amuzajn kanzonetojn, kiuj placis multe al la aŭdantaro.

Ankoraŭ, mankis agrabla surprizo je la fino de la postmanĝado, ĉar esperantisto de Alcoy, nia samideano Ismael Martínez mirigis nin per prestidigita prezentaĵo. Li rolis kiel vera profesiulo. Ankaŭ li ricevis varmajn aplaŭdojn.

Post ne longe komenciĝis la adiaŭoj. Salutojn, ĉirkaŭbrakojn, kuragigajn vortojn. Ni ne volas fini tiun ĉi kronikon ne esprimante nian grandan dankemon al ĉiuj personoj kaj korporacioj kiuj helpis nin. Ni devas menci: Lian Urbestran Moŝton; la Skabeno pri Kulturo; la Sparkason de Alicante kaj Murcia; la Provincan Sparkason de Alicante; la Direktoron de la Publika Kolegio «Primo de Rivera» profesoron José María Culiáñez, fine ĉiujn kuj per siaj streboj kaj entuziasmo kunhelpis nin en la sukcesigo de ĉi tiu 50-a datreveno. Finfine, kortuŝan petegon: Ke la junaj esperantistoj, kiuj postvenos nin, reprenu la torĉon, kiun ni, la veteranoj, lasas eklumigitan kaj ke post la fino de aliaj 50 jaroj, ili povu memorfesti la jarcenton de la Grupo.

V. MOLINS REIG

NIAJ GRUPOJ

VALENCIA.—La bulteno de la Valencia E-Grupo titolita «Valencia Luno» en sia № 9 publikigas diversajn informojn, inter ili dupaĝa artikolo pri «Las Fallas», la plej popularaj kaj mondkonataj festoj de Valencio, verkita de s-ano F. Aliaga.

Ankaŭ en la sama bulteno ni povas legi ke lunde, merkrede, kaj vendrede okazas Elementa Kurso kaj por tiuj kiuj jam finis tian kurson, oni aranĝas konversacian kurson.

GIJON.—En «Heleco» ni legas ke la 20-an de la pasinta januaro okazis en la Aktosalono de la Sparkaso de Aviles, je la 8-a vespere, prelego pri Esperanto. La preleganto estis nia s-ano **Alcibiades González Meana**, kiu parolis pri la temo «Una solución: EL ESPERANTO».

La evento estis aranĝita de la Art kaj Metilernejo de Aviles, kies direktoro s-ro Victor Urdangaray prezentis la preleganton.

En ĉi tiu industria urbo okazas nun Elementa Kurso de Esperanto, gvidata de nia senlaca kaj entuziasma s-ano Santiago Mulas.

CASTELLDEFELS.—La Esperanto-Grupo de ĉi tiu urbo, kun sidejo en la Domo de la Kulturo apartenanta a la Urbokon-silantaro ĵus aliĝis kiel protektanta mem-

bro al la Hispana Esperanto-Federacio. Samtempe, ĝi aliĝis al la Kataluna E-Asocio. Pri tio kaj en kataluna lingvo, oni informas en la revuo «El Butletí de Castelldefels» de marto.

La 13-an de marto kaj je la 7,30 vespere, prof. Lluís de Yzaguirre prelegis pri «El mundo juvenil y el Esperanto» en la Domo de la Junularo.

VALLADOLID.—En la biblioteko de la kultura kaj sporta Asocio «Michelin» nia aktiva membro Luis Pelayo aranĝis ekspozicion pri Esperanto kun la celo montri al la vizitantoj la diversajn aplikojn de Esperanto. La ekspozicio, kvankam malgranda, prezentis skize lernolibrojn, revuojn kaj periodaĵojn, inter ili «BOLETIN», «HEROLDO DE ESPERANTO», «ESPERO KATOLIKA», k.t.p., turismajn broŝurojn, resume, ĉion necesan por doni ideon pri la disvastigo de la Internacia Lingvo. La materialon de la ekspozicio estis pruntedonita de la loka E-Grupo kaj de H.E.F.

Okaze de la Semajno pri Internacia Amikeco prelegis esperantlingve s-ano **Luis Martín Herrero**, Prezidanto de la Grupo pri «Monero trakuras la ekonomion» kaj s-ro **Luis Hernández**, Sekretario de H.E.F. pri «Generacia problemo». Ambaŭ prelegoj okazis en la sidejo de la Grupo.

44-a Hispana Kongreso de Esperanto

FESTPAROLADO: Dum la solena inaŭguro de la kongreso prelegos hispanlingve pri la temo «Función del Esperanto en los fines de desarrollo económico y cultural del Turismo» s-ano Manuel Figuerola Palomo, grava funkciulo de la Instituto Español de Turismo.

SEMINARIO PRI TURISMO: La Seminario kiu traktos la temon: Turismo, ĉu socia fenomeno? estos gvidata de s-ro Gian Carlo Fighiera, funkciulo de la Monda Turisma Organizo. Ĉiu kiu dezirus prezenti informojn por la Seminario, b. v. sendu vian raporton, tajpitan je duobla spaco, kaj ne pli longa ol ses folioj, al la adreso de la Kongreso: 44-a Hispana Kongreso de Esperanto, Sol 75 SEVILLA-3 (Hispanujo).

GLUMARKOJ KAJ BILDKARTOJ: Kun la celo diskonigi vastskale nian Nacian Kongresojn L.K.K. pretigis foliojn da glumarkoj kaj belan koloran bildkarton kiu aperas sur la kovrilo de nia BOLETIN, kaj kiuj vi povas aĉeti mendante ekzemplerojn ĉu al L.K.K., ĉu al la Libroservo de H.E.F. La prezoj estas jenaj: Folio da glumarkoj, 5 p-toj; Bildkarto, 15 p-toj plus sendokostoj.

Estado de cuentas de libro-servo de H.E.F. 1983

Existencias al 1 de enero de 1983		252.601 pts.
Ventas realizadas en 1983	550.758 pts.	
Valor precio compra	398.658 "	
Beneficio bruto	152.100 "	
Gastos Generales (papel, sellos, etc.) ..	40.631 "	
Beneficio neto	111.469 "	
Entregado a Tesorería de H.E.F.	25.000 "	
Beneficio final	86.469 "	86.469 pts.

Existencias al 31 de diciembre de 1983

339.070 pts.

Existencias en material ...	252.601 pts.
En Caja Ahorros Popular ..	6.943 "
En Caja Postal	45.353 "
En metálico	829 "

Suma

339.070 "

Valladolid, 31 de diciembre de 1983

EL ENCARGADO DEL SERVICIO DE VENTAS

José González Suárez

Vº Bº

LA PRESIDENTA DE LA FEDERACION

María Rafaela Urueña Alvarez

KAMPANJO E-100

Kiel vi jam scias, en la Hispana Kongreso de Esperanto okazinta en Zaragoza oni starigis Hispanan Jubilean Komisionon kiu prezidas s-ano Salvador Aragay por inde prepari la Centjariĝon de la Internacia Lingvo ESPERANTO kaj, certe, ambicia programo estas en projekto.

Por ke la programo, tute aŭ parte, realiĝu estas nepre necesa la kunlaboron kaj la helpon de ĉiu hispana samideano ne nur labora, ĉiu laŭ sia ebleco sed ankaŭ financa. En tiu lasta kazo, ĉiu, pli malpli, povas kontribui per mondonacoj sendotaj al la kasistino de H.E.F. f-ino Carmen Conde aŭ el la konto de H.E.F. ĉe Caja de Ahorros Popular, skribante, samtempe, bildkarton menciante ke la donaco estas por la Kampanjo E-100.

La donacojn ricevintajn ni listigos, regule, en la paĝoj de «BOLETIN».

Ni anticipe kaj nome de la Jubilea Komisiono sincere antaŭdankas vian malavaran helpon.

ESTRARO DE H.E.F.

SINCERECO, PLEJE

Fronte al 1987-a, ĉiuj entuziasmaj esperantistoj revas pri grandaj eventoj kiuj konigu al la mondo la gravecon de nia lingvo kiel efika helpo por solvi la nuntempajn internaciajn problemojn. Tiel facile estas **imagi** agrablajojn, ke tre malmultaj personoj sukcesas eviti la tenton kredi je la baldaŭa kaj senpena venko de Esperanto. Ni estas homoj multfoje emaj al elreviĝo ĉar ne ŝatas la realon tian kia ĝi estas. Kaj, se ni serĉas kaj klopodas gravan antaŭepuŝon, ni celu racie atingi la sukceson; alie, nia **serĉo** estos anstataŭigita de la **ŝerco** de la aliaj.

Ni estu sinceraj, Esperanto disvastiĝos se ni instruas ĝin al ceteraj, se ni interesiĝas ĝin al niaj proksimuloj. Nek la Deklaracioj de Oficialaj Instancoj, nek la Paroladoj de elstaraj kaj saĝaj personoj, nek la cirkonstancaj kaj sporadaj aliĝoj de iuj gravaj homoj havigos veran sukceson al la Movado. Kontraŭe, tute kontraŭe. Al Esperanto ne helpas jam la triumfismo ĉar nia socio scias tre bone la malgrandan influon de nia kara lingvo. Foje, aŭ eble tre ofte, ni atingas de niaj samlandanoj nur komprenemon gentilan. Sed gentileco, malgraŭ ke ĝi estas necesa por agrablighi nian vivon, ne sufiĉas por ke Esperanto disvatigu.

La sukceso alvenos nur kiam la plimulto de homoj parolos la Zamenhofan lingvon, kiam ni disponos pri sufiĉe granda kvanto da instruistoj kaj kiam ni havos taŭgan sistemon por kapablighi dece voluntulojn kiuj deziros labori en la Movado kiel veraj instruistoj pri Esperanto. Resume, estas nepre havigi al la Movado la plej grandan kvanton da homoj kapablaj lernighi la lingvon.

Kompreneble, ne konvenas liveri al kiu ajn Dipolomon de Kapableco. La seriozecon de nia Movado postulas veran pretigon; ĉiuj kiuj agados instruante, devas paroli flue la lingvon kiun ili instruas, koni bazajn pedagogiajn rimedojn, scipovi la plej gravajn eventojn de la Historio de la Movado kaj spertiĝi pri Esperanta Literaturo. Aliflanke, maleblas la enkonduko de Esperanto en la lernejon se ni ne disponas pri profesiaj instruistoj kiuj estas samtempe scipovantoj de Internacia Lingvo, ĝia Movado kaj ĝia Literaturo. Vidalvide al la embarasa situacio aktuala de nia mondo, la nuntempa esperantista generacio kuraĝu por trovi efikan solvon kaj ĝin plenumu akurate.

Ekde la pasinta Oktobro, kiam mi estis nomumita Hispana Sekciestro de I.L.E.I., mi prizorgis senĉese la disvastigon de Esperanto, ĝenerale, kaj ties enkondukon en la Lernejon, speciale. Ĉi-cele mi estigis Agadplanon por la kuranta lernejo realigotan, helpe de ĉiuj respondecaj samideanoj, dum la venontaj monatoj. ILEI intencas efektiviĝi ĝin per ĉiuj rimedoj, izole aŭ kun la kunlaboro de la ceteraj sed, nepre. La Elementa Kurso jam funkciis antaŭe kaj pludaŭros, jen koresponde, jen per ĉeestado de normalaj klasoj; la meza kurso jam komenciĝis en iuj lokoj de nia Lando kaj la Supera Esperanto-Lernejo estos organizata tiel baldaŭ kiel mi komencos ricevi aliĝojn. Se la estraro de HEF konsentas pri la Meza Kurso, ĝi okazos ĉiujare, dum la Hispana Kongreso okazos la ekzamenoj.

Niaflanke, ni ekzamenos ankaŭ la gelernantojn en la urbo kie rekontiĝos esperantistoj partoprenantaj en la **ANDALUZA KONGRESO DE ESPERANTO**.

La enkonduko de Internacia Lingvo tra la Asocioj de Gepatroj de Gelernantoj estas alia el la celoj de la venonta agado de ILEI. Mi opinias ke ni nepre devas kontakti respondeculojn de ĉi tiuj organizoj por profiti la ŝancojn kiujn ili havigas al ni. Tiurilate konvenas, ke ĉiu samideano kiu konatiĝas kun membroj de la Estraro de tiaj asocioj sciigu al ili pri Esperanto, la Movado, k.t.p.

La venontan someron, enkadre de la Dua Andaluzo Kongreso de Esperanto, okazonta en Malago, ĉiuj personoj interesitaj pri la instruo de Esperanto povos partopreni en la seminario pri **LA ENKONDUKO DE ESPERANTON EN LA LERNEJON** organizotan de ILEI. Ĉar la temo estas grava, estas necese pritrakti ĝin serioze. Gesamideanoj dezirantaj partopreni en la menciita seminario sin turnu al: ILEI. Andrés Martín González; Trinidad Grund, 28, 2ª Drcha; MALAGA-1. Guste en ĉi tiu urbo okazos ĉi jare la ekzamenoj de la MEZA KURSO. Jen la respondaj programoj de Literaturo kaj Historio de la Movado.

ESPERANTA LITERATURO

(La gelernantoj pruvu sian scipovon parolante en Esperanto, flue, pri la biografio kaj verkaro de la aŭtoroj)

Ludoviko Lazaro Zamenhof

Baghi

Bultuis

Stellan Engholm

William Auld

Edwin de Koch

Erosenko

Luis Mimó

Kabe

Kalocsay

Grosjean-Maupin

Privat

Waringhien

Luyken

Fernando de Diego

J. Régulo Pérez

HISTORIO DE LA MOVADO

(Same, la gelernantoj parolu en Esperanto)

1. La kreinto de la Lingvo. La gazeto «La Esperantisto».
2. Sveda Periodo: Personoj kaj eventoj.
3. Franca Periodo: Personoj kaj eventoj.
4. La Kongresoj, ĝenerale, Organizo, aranĝoj, festoj, k.t.p.
Deklaracio pri la naturo de E-ismo kaj la neŭtraleco de la Kongresoj.
5. La Barcelona Kongreso (1909-a, la 5-a Universala Kongreso).
6. UEA: Deveno, oranizo, celoj kaj organoj. Landaj, Fakaj kaj kunlaborantaj Asocioj. Rilatoj kun internaciaj organizoj. Eldonaĵoj de UEA.
7. Institucio Hodler 68.
8. Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la monda lingvo-problemo.
9. TEJO.
10. Fakaj Asocioj ne ligitaj al U.E.A.
11. Institucioj de U.E.A.
12. Kulturaj edukaj agadoj de UEA.
13. Delegita Reto de UEA.
14. ILEI: Deveno, celoj kaj organizoj.
15. La Movado en Hispanio (de 1887-a ĝis nun).
16. SAT: Deveno, celoj kaj organizoj.
17. Oomoto: Deveno, celoj kaj organizoj.
18. La brazilaj esperantistoj kaj Esperanto.
19. La Neŭtrala Esperanto-Movado (NEM).
20. Mondpaca Esperanto-Movado (MEM).

ANDRES MARTIN GONZALEZ
(Hispana sekciestro de ILEI)

EN 1992-a, ĈU OLIMPIKOJ EN BARCELONO?

La urbo Barcelono, estas proponita por sidejo de la Olimpiaj Ludoj en 1992-a. Tio estas grava por la sportemuloj, sed vere la Olimpiaj Ludoj havas tre gravan spiritan signifon, eĉ por ni esperantistoj.

Nia civilizacio havas du precipajn fontojn: la helenan aŭ grekan laŭ intelekto kaj la romanon laŭ organizo. La filozofio kaj la libera penso tiel prosperis en la helena kulturo, ke eĉ nun lumigas nin. Romo heredigis al ni la ŝtatan organizon. Niaj ŝtataj institucioj rekte rilatiĝas kun la romanaj.

Kiam floris la helena kulturo, Grekujo ne formis unu ŝtaton, ĝi estis aro da sendependaj ŝtaturboj, eĉ ne federigiĝintaj, en multaj el kiuj regis la demokratio. Aro da ŝtatetoj, kvankam liberaj, sen instituciaj ligiloj, ofte militantaj inter si. La intermilitado ruinigis la liberon kaj la tiama Grekujo ne estis kapabla propravole unuigi. Ĝi estis unuigita perforte, kaj al la perfortan unuecon sekvis la dekadenco. Nia Eŭropo, kiel Grekujo de la nuna mondo, el tio povas eltiri gravegan lecionon.

Olimpio estis templo de la dio Zeŭso, kien oni pilgrimis ĉiun kvaran jaron kaj kie samtempe okazis sportaj konkursoj. Por la grekoj tio estis la precipa unuigilo. La pilgrimo al la komuna dio, kaj la lojala sporta konkurso, kies gajnintoj ricevis nur honoran kronon el olivfolioj. Por povi ĉeesti la pilgrimadon kaj aranĝi la sportkonkurson oni deklaris militpaŭzon dum unu monato. Ili ne estis kapablaj daŭrigi tiun militpaŭzon dum la intertempo de kvar jaroj. Se tio estus okazinta eble la tuta historio estus alia, sed nun oni obstine stumblas sur la sama ŝtono.

En la lastaj jaroj de la pasinta jarcento, konkrete en 1894-a, agnoskante la pedagogiajn kaj sociajn valorojn de la Olimpiaj Ludoj por la junularo kaj por la kolektiva konsciigo kaj interfratiĝo de la popoloj oni restarigis ilin. Tiu celado ankaŭ estas la nia. Certe tia celado estas tiel gravega por la homaro, ke ankoraŭ ĝi estas revo, sed ĉiuj klopodoj devas esti unuigitaj por ĝin realiĝi.

La antikvaj grekaj Olimpiaj Ludoj malsukcesis. Nek tiam nek nun, la paca afero estas facila kaj krom la pacasento estas necesa la pacorganizado kaj ambaŭ, ankoraŭ ne havas sufiĉan forton por kontraŭstari la militon. La paco ne estos senkosta donaco.

La tiamaj grekoj parolis unu saman lingvon, la grekan. La grekoj povis interkompreniĝi. La modernaj Olimpiaj Ludoj ne havas tian komprenigilon de sama lingvo. Kvankam kunludantaj ili restas «barbaroj» en la greka senco de unu ne komprenanta la aliajn kaj ĝia efikeco por la kolektiva konsciigo kaj fratiĝo de la popoloj restas duba. En 1936-a la Olimpiaj Ludoj okazis en la Germanujo de Hitlero. kun la tuta aparato de la naciisma propagando. Samtempe, kiel protesto oni intencis organizi en Barcelono la Popularan Olimpiadon ĝuste en la sama dato, 19-a de julio, en kiu eksplodis nia intercivitana milito. Dek mil eksterlandanoj venintaj al Barcelono eskapis kiel ili povis de tiuj sangaj okazaĵoj, kiuj estis la antaŭakto de la Dua Tutmonda Milito.

La grekaj Olimpiaj Ludoj havis la spiritan forton de la komuna dio Zeŭso, sed ĝi ne estis sufiĉe forta por unuigi la grekojn. La aktualaj Olimpiaj Ludoj nerekte pro la nura kunvivado estas unuiga forto, sed ne sufiĉa. La nunaj Olimpiaj Ludoj estasabelo kaj ne havas unuigan spiritan forton. Al ili mankas la lingva ilo Esperanto kaj la unuiga forto de ĝia Interna Ideo. Tamen ni simbole voĉdonas por ke ili okazu en Barcelono en 1992-a kaj, ke kie ajn ili okazos, se Barcelono ne havos ŝancon, ne ripetigu la samo kiel en 1936-a. Ke la paco daŭru plue kvazaŭ, la Olimpiaj Ludoj okazus ciumare kaj daŭrus dum la tuta jaro kun la reciproka militpaŭzo.

Niaj fervojistaj samideanoj aranĝis en Barcelono esperantistan oficejon en 1982-a okaze de la Futbala Ĉampionado. Ni estu pretaj por sama helpo al la venontaj olimpiaj esperantistoj kun la deziro, ke same ili kiel ni, estu multnombraj por ke reale, ekzistu kolektiva etoso de interfratiĝo de popoloj.

G. Moya

PALINDROMOJ

Se la memoro ne perfidas la aŭtoron de ĉi tiuj linioj, jam antaŭ longe nia karmemora membro de la Akademio de Esperanto, la forpasinta profesoro Delfi Dalmau, ie pritraktis la kuriozan vortludan lingvo-apartaĵon, konatan sub la termino PALINDROMO. Laŭ PIV, ĝi estas frazo aŭ verso, kiun oni povas legi en ambaŭ direktoj.

Tial ke mi proprasperte povis konstataĵi la interesiĝon kaj sciemon diversloke montritajn por tiuj frazoj, kiuj, kiel dirite, same legeblas de maldekstre dekstren kaj inverse, jen kial mi decidis transkopiai, por la legantoj de «Boletín», kelkajn tiajn kunaĵojn da vortoj.

En kastilia lingvo: «Dábale arroz a la zorra el abad»; «Es Adan, ya ve, yo soy Eva y nada sé»; «Nuria sonría y ate la maleta y a irnos a Irún»; «Así Mario oirá misa»; «Oído, el ateo poeta le odio»; «Somos o no somos»; «Se corta Sarita a tiras atroces»; «Ella te dará detalle»; «No traces en ese cartón»; «Luz azul».

En Esperanto: «Ne mateno, bone tamen»; «Saĝa nomo naĝas». (Ambaŭ troviĝas en PIV); «Anaso sana»; «Orumata muro»; «Sane volema kara rara kamelo venas» (La du lastaj estas eltiritaj el malnova numero de «Heroldo de Esperanto»).

Ĉar tiun ĉi liston tre probable oni povos pliriĉigi, la subskribinto dankos kaj certe kvitancos al tiuj legantoj, kiuj bonvole sendos al li aliajn palindromojn, ĉu en kastilia, aŭ en Esperanta lingvoj.

V. Hernández Llusera
Av. Onze de Setembre, 59
SABADELL (Barcelona)

PRI IUJ VERBOJ

En «Kompleta gramatiko kaj vortfarado» (Paul Fruictier-Grenkamp-Kornfeld-paĝ. 57-a) oni parolas pri pasivaj verboj: «Formitaj per kunligo de verbo esti kun pasivaj participoj».

Tiaj verboj ne estas pasivaj sed ja aktivaj verboj en forma pasiva: En Esperanto ne ekzistas pasivaj verboj kiel en Latino aŭ greka lingvo.

Sed en Esperanto ekzistas adjektivaj («estaj») verboj. Ĉi tiuj estas ĉiuj verboj kies radiko estas adjektiva, senaj je «ig» aŭ «iĝ» (Samloke paĝ. 87-a).

Do, ĉiuj verboj de ĉi tiu klaso ne estas aktivaj nek transitivaj, kaj ilia signifo estas **ĉiam** «esti tia».

Tamen eĉ en P.I.V. oni denove asertas ke el la radiko **ind** venas la verbo **indi** kaj ke ĉi tiu verbo egalas **meriti**, kaj oni povas diri **indi premion**.

Laŭ mia vidpunkto, ĉar en Esperanto ne ekzistas esceptoj, **indi** signifas «esti inda» je (al) kun nominativo.

Mi ne scias ĉu en alia okazo P.I.V. faletas en la sama eraro; sed mi opinias ke reguleco (plena senescepteco) estas fundamentaĵo en nia lingvo kaj oni devus revizii ĉi tiun aferon.

Kompreneble, verbigo de ĉiuj sufiksoj volapukigos Esperanton, eble ne alportante necesajn nuancojn. Sed bonaj prozistoj iom post iom malkovros la oportunecon de novaj **estaj** verboj. Sed ĉiam tiaj verboj ne estos transitivaj nek samvaloraj al iu ajn transitiva verbo Ili ja ĉiam estos adjektivaj aŭ **estaj** verboj ne postulantaj akuzativon.



LA KAVALIROJ EL BLANIK

Sub-Premio «Sancho-Rebullida» en la Internacia Literatura Konkurso de la «Fundación Esperanto» en 1982-a.

Pasis jam multaj jarcentoj de la tempo, pri kiu mi rakontos —tempo, tre malbona por la tuta tiama reĝlando Bohemio. La lando estis riĉa— ĉar riĉaĵo ĉiam kaj ĉie vekis kaj vekas envion, oni ne miru, ke solduloj kaj diversaj malamikoj atakis la landon de ĉiuj flankoj, flarante la eblon rikolti tie, kie ili ne semis. Malamikoj grandnombre invadis la regionon, sieĝis kastelojn, murdis, rabis, ŝtelis. Morto pasis man-en-mane kun fajro kaj incendioj, kiuj konsumis domojn kaj dometojn, vilaĝojn, tutajn urbojn. Neniu estis certa pri sia vivo.

Forta malamika armeo penetris foje al centro de la lando, volante daŭrigi al la ĉefurbo Praha kaj tiun konkeri. Komence

ŝajnis, ke ĉio iros glate. Malamikoj staris jam antaŭ la urbo Vlaŝim - kaj nenia rezisto, ili pasis tra senhoma regiono. La loĝantoj aŭdinte pri la malamika armeo, fuĝis sur ĉeurban monton Blaník eĉ kun sia havaĵo, brutaro kaj rikolto. Tie ili tuj komencis konstrui baraĵojn, remparojn kaj fortikaĵojn, kaj atendis la malamikon.

La malamika armeo fulme invadis sub la monton, sieĝis ĝin de ĉiuj flankoj kaj komencis ĝin tuj konkeri; sed plenmano da bravaj kaj kuraĝaj ĉeĥoj sukcese sin defendis kontraŭ multe pli grandnombre malamiko. Sepfoje la sieĝantoj impetis kontraŭ ĉeĥaj baraĵoj sur Blaník, grimpis supren, glitis sur deklivoj kaj ŝtonoj, falis, denove impetis - kaj

sepfoje sensukcese. Jam Ŝajnis, ke la defendantoj venkos.

Sed la situacio en la ĉeĥa tendaro estis tre malbona. Multaj falis, multaj estis vunditaj. Furiozaj bataloj ne permesis al la defendantoj fermeti la okulojn —kaj estis neniu, kiu anstataŭ— igus la lacajn batalantojn kaj permesus al ili iom ripozi.

Venis la decida momento. Malamika komandanto elektis novajn, freŝajn batalantojn kaj tiuj atakis la supron de Blaník de nove. Plenajn du tagojn kaj noktojn daŭris tiu batalo. Herbo ĉirkaŭ Blaník ruĝiĝis de sango. Korvoj super la monto atendis, kiam venos ilia vico, kaj laŭte grakis, antaŭsentante multajn viktimojn kaj riĉan festenon. Kaj estis tiuj viktimoj vere multaj.

Al krio de malamikoj ĉe lasta tiutaga atako respondis nur silento. Falis eĉ la lasta ĉeĥa defendanto. Malamikaj solduloj surgrimpis la barajojn - kaj jen: ĉie kusas mortaj batalantoj, kun glavoj kaj armiloj enmane. Ili kuŝis sur ĉeĥa tero, kiun ili tiel brave kaj kuraĝe defendis.

Malamika armeo fortenis kun si ĉiujn provizojn kaj havaĵon de mortaj ĉeĥoj kaj formariĝis. Blaník orfiĝis.

Pasis tagoj kaj noktoj, semajnoj, monatoj, kaj en la regionon ĉirkaŭ Blaník revenis homoj - amikoj kaj parencoj de tiuj, kiuj falis. Ankaŭ la tero kovris siajn vundojn per herbo kaj arbustoj. La vivo iom post iom revenis en siajn relojn.

La homoj, rememorante siajn amikojn, surgrimpis la monton kaj serĉis la mortajn batalantojn, volante ilin entombigi, kiel decas. Sed kia miro! Ili trovis nenion - nek siajn mortintojn, nek ostojn de ĉevaloj, nek barajojn aŭ remparojn. Ĉio estis for kvazaŭ ĉio estus nur songo! Ili skuis la kapon, ne volante kredi al siaj okuloj kaj ne povante al si klarigi, kio okazis.

Tiu stranga afero baldaŭ disfamiĝis en la tuta regiono, sed ankoraŭ pli strangaj aferoj sekvis. Pasis ĝuste unu jaro de la sangsoifa lasta batalo sur la supro de Blaník, kiam kamparano, pluganta sian kampon sub la monto, ekaŭdis grandegan bruon, tintadon de glavoj kaj henantajn ĉevalojn - kaj ĉion el interno de Blaník! Li kuris en la vilaĝon, rakontis ĉion al siaj najbaroj kaj alkondukis ilin al la monto - kaj ĉiuj kun timo aŭskultis. Kvazaŭ granda armeo de kavaliroj preparus sin al batalo! La kamparanoj venis al la monto ankaŭ la sekvantan tagon - kaj nenio, ĉie regis silento, ke ili aŭdis eĉ sian timigitan spiron.

Pasis plia jaro - kaj alia vilaĝano ekvidis tiujn misterajn kavalirojn. Li saltis malantaŭ arbuston kaj rigardis, kiel iliaj ĉevaloj soife trinkas akvon de rivero.

Similaj aferoj okazis ĉiujare. La homoj ĉesis timi, venkis ilia sciivolemo; sed neniu sciis ĝustan respondon al la demando, kiun ĉiutage unu donis al la alia.

La plej strangan okazaĵon spertis paŝtisto, kiu paŝtis siajn ŝafojn sub Blaník. Jam vesperiĝis - li volis do peli la gregon hejmen, kalkulas la ŝafojn kaj vidas: unu ŝafo mankas. Kie ĝi povas esti? Restis nenio alia ol serĉi ĝin, baldaŭ venos nokto! Li serĉas, serĉas, subite staras ĉe Blaník - kaj jen, la monto estas malfermita, ĝia nigra truo invitas la paŝtiston eniri! Li hezitis. «Sed tamen, ĉu la ŝafo ne troviĝas ĝuste ĉi tie?» pensis la paŝtisto. Tiu ideo puŝis lin internen, li faris unu, du paŝojn - kaj la monto malantaŭ li subite fermiĝis. «Nu, mi troviĝis en bela kaĉo, vere», diris al si la paŝtisto; sed ĉar li estis homo kuraĝa, li faris ankoraŭ trian, kvaran kaj pliajn paŝojn, ĝis li venis en grandan salonon. Kaj kion li vidas? Ĉie sidas kavaliroj - iamaj batalantoj de sur la supro de Blaník, kun krestokaskoj sur kapo kaj glavo en la mano, vestitaj en siaj dratĉemizoj, apude staras iliaj ĉevaloj - ĉiuj preparitaj al batalo. Kaj ĉiuj dormas. La paŝtisto rigardas kaj miras, pasas de unu al la alia - kaj subite sentas dormemon. Li sidigis do en la plej proksiman angulon, apogis sin je la roko - kaj jam ankaŭ li dormas, same kiel la kavaliroj.

Vekis lin bruo kaj tintado de glavoj. La kavaliroj leviĝas, eksidas sur siajn ĉevalojn - kaj la monto malfermiĝas, rekte kontraŭ la angulo, kie sidas la paŝtisto. Li rememoris, ke hieraŭ li lasis siajn ŝafojn sur herbejo kaj

volis eliri, sed haltigis lin kavaliro:

«Neniam forgesu, ke ni ĉiuj en la roko pretas kiam ajn batali. Diru al viaj najbaroj, ke ni gardostaras ĉi tie poreterne kaj ke ni helpos al ĉeĥoj, kiam venos la plej malbona tempo. Diru ankaŭ, ke oni defendu sian patrujon kaj rajtojn ĝis la korpdisŝiro, same kiel faris tion ni».

La paŝtisto eliris kaj eĉ li mem ne sciis, kiel. Sian gregon li ne trovis kaj tial li rapidis hejmen —sen en la vilaĝo oni bonvenigis lin, kvazaŭ li leviĝus el tombo. Pasis ĝuste unu jaro de lia malapero— tiel longe li dormis en Blaník!

La okazaĵo rapide transpaŝis limojn de la regiono, kaj baldaŭ oni rakontis al si pri la kavaliroj el Blaník en la tuta lando.

La reĝlando Bohemio spertis ankoraŭ multajn malbonajn jarojn kaj jardekojn; sed ĝis nun ne venis tempo la plej malbona, ke la kavaliroj devu forlasi la monton kaj helpi al sia lando. Kiam jam ŝajnis, ke ĉio estas perdita, vivaj ĉeĥan batalantoj tamen nur sciis defendi siajn rajtojn per sia saĝo kaj armiloj. Tiuj, kiuj falis en justaj bataloj, viciĝis laŭdire al la kavaliroj el Blaník, kun ili gardostaras en interno de la monto kaj atendas la tagon, kiam ilia patrujo, multfoje suferata kaj humiligata, bezonos ilian helpon.

Vladimir Vána
(Plzen, Ĉeĥoslovakio)

Modificaciones al directorio

ALTAS

ALICANTE	2.719	Macía Riquelme, Antonio; Reyes Católicos 61, 1º A, d. p. 3.
	2.720	Cabezos Jiménez, Francisco; Los Doscientos, 37, 1º, d. p. 7.
HOSPITALET DE LLOBREGAT (Barna)	2.721	Guerrero Cots, Marteno; Feixa Llarga, s/n.
	2.722	López Ranz, Josefa; Pza. del Perú, 5, 2º F, d. p. 16.
	2.723	Fleta Zaragozano, José A.; Sta. Teresa, 20, 7º, d. p. 6.
MADRID		
ZARAGOZA		

BAJAS

ALICANTE	2.051	Delgado Jarillo, Germán.
	2.487	Gonzalez Perabá, Dolores
	2.583	Ruiz Ruzafa, Antonio.
	2.482	Sabater Asensi, Soledad.
	2.620	Sánchez Mayoral, Francisca.
	823	Soler Pérez, Juan
	2.619	Grupo Juvenil de Esperanto.
	2.621	Chavarro de Pastor, María Lina.
	2.052	Pedro Signes, Vicente.
	2.528	García Romero, Miguel.
BENIDORM ELCHE	2.530	Herrero Ramírez, Rosa.
	2.576	Alvarez Jerez, Antonio.
ORIHUELA SAN JUAN PALMA DE MALLORCA BARCELONA	2.569	Huertas Rodríguez, Rafael.
	2.557	Cabot i Ramis, Mateu.
	2.614	Lerroux Torres, José.
	2.449	Linares, José Pedro.
	2.471.	Martínez Ferré, Jordi.
MANRESA	1.656	Pujol, Elvira.
	2.175	Saumell Vila, Pedro.
	497	Travé Baró, Esteban.
	1.263	Travé Baro, Pedro.
	2.625	Domingo Carbonell, Daniel.
2.624	Domingo Oliver, Joaquín.	
VILLAFRANCA DEL PENEDES	1.840	Plans Mitjans, Juan.
	2.575	Villar Barrio, Servilio.
	2.592	Díaz de Terán, Gloria.
PANCORBO (Burgos)	2.567	Benitez Crespo, Gregorio.
	2.617	Fernández Oliva, Pablo.
	2.554	Cano Romero, Rafael.
JARAIZ DE LA VERA (Cáceres)	2.422	Muñoz Muñoz, Jerónimo.
	2.565	Fernández, Antonio Agustín.
	1.811	Catón Gavilán, Andrés.
S. FERNANDO (Cádiz)	2.597	González Serrano, Fernando.
	2.622	Doval Reija, María Irene.
	1.726	Mejorero Domínguez, Fabriciano.
CIUDAD REAL	2.616	Bueno Sequera, Jorge.
	1.814	Figuerola Palomo, Manuel.
	2.220	Sáinz Vaquero, Pilar.
CAÑETE DE LAS TORRES (Córdoba)		
CORDOBA		
DURCAL (Granada)		
ANDUJAR (Jaén)		
NAVAS DE S. JUAN (Jaén)		
MADRID		

TORREJON DE ARDOZ

(Madrid)	2.610	González Ortega, Edurne.
MALAGA	2.594	Fernández Verni, María Teresa.
MELILLA	2.463	Oña, Silvia.
MURCIA	2.613	García Zapata, María del Carmen.
GIJON (Asturias)	2.401	García Rivera, María Nieves.
TELDE (Las Palmas de Gran Canaria)	143	Frugoni Pérez, José.
BELLAVISTA (Sevilla)	2.379	Cintas Vaquero, José.
TARRAGONA	2.352	Serrano Subietas, José María.
TALAVERA (Toledo)	2.578	Magistrati Almaraz, María del Carmen.
VILLATOBAS (Toledo)	2.596	Arenas Verde, Tomás Carlos.
VALENCIA	2.587	Casquero de la Cruz, Clara.
	2.193	Pérez Garcés, Federico.
	2.104	Julia Puig, Dorita.
	2.623	Rodríguez Pérez, Francisco.
BURJASOT (Valencia)	1.126	Blanes Picó, Roberto.
VALLADOLID	2.507	Jiménez García, María Josefa.
BILBAO (Vizcaya)	847	García López, Francisco.
	1.171	Palacios Herranz, Rafael.
ZARAGOZA	2.469	Ballestin, Andrés.
AZUARA (Zaragoza)	2.524	Soriano Marco, José.

CAMBIO DE DOMICILIO

ALGORTA (Vizcaya) 1.035 Juanes Sáinz, Julio: Villanueva, B-14.

SOCIOS PROTECTORES 1983

60	Juan A. Madrazo	(1.046)
61	Miguela Malón	(2.152)
62	José María Cortina	(2.697)
63	Bartolomé Figueras	(2.700)
64	José Climent	(2.438)
65	José Ivern	(2.439)
66	Juan Carlos Ruiz	(2.476)
67	Félix Gómez	(598)
68.	María Soldevila	(2.704)
69	Dolores Martínez	(2.338)
70	Angel García	(350)

SOCIOS PROTECTORES 1984

1	María Rafaela Urueña	(1.904)
2	María Pi Maynar	(2.194)
3	Antonio Gil Contreras	(369)
4	Grupo de Esperanto, Bilbao	(849)
5	Diego R. Biedma	(2.574)
6	Eleuterio Moreno	(998)
7	Grupo Esperanto, Valencia	(1.187)
8	Esperanto-Fako, Barcelona	(1.804)
9	Alfonso Escamilla	(623)
10	Sociedad Esperantista «ESTO»	(1.221)
11	Consuelo Hervás	(1.975)
12	Antonio Ferrer	(1.860)

DONATIVOS 1983

Suma anterior	10.475 pts.
Faustina Martínez	1.000 "
Manuel Alcubilla	250 "
Sr. Moriones	100 "
Félix González	200 "
Pedro Alcedo	100 "
C. T.	1.275 "

DONATIVOS 1984

Tomás Apraiz	100 pts.
Cecilia Gutiérrez	100 "
Giordano Moya	610 "
Antonia Galvani	200 "
Pepita Gallart	1.000 "
C. T.	1.225 "

TOTAL 13.400 pts.

Suma y sigue 3.235 pts.

24aj Internaciaj Floraj Ludoj

Dezirante plu reokazigi la glorajn INTERNACIAJN FLORAJN LUDOJN, kiuj tiel solene prezentiĝis en diversaj urboj de Katalunio kaj la insulo de Majorko.

Kataluna Esperanto-Asocio, denove invitas la esperantistajn poetojn kaj prozistojn ĉiulandajn, konkurse konkuri per siaj plej valoraj verkoj en tiu ĉi tradicia Beletra Trobadora Festo, kiu okazos en la kadro de la 20-a Kataluna Kongreso de Esperanto.

La verkojn oni sendu, po kvar ekzempleroj nepre tajpitaj je duobla interspaco, nur ĝis la 30-a de junio 1984-a, laŭ la poŝtstampo, al jenaj nomo kaj adreso de la sekretario: Gabriel Mora i Arana, strato Carrió, 7-4, Manresa, Katalunio, HISPANIO.

La nepremiitaj aŭtoroj rajtos peti la resendon de siaj konkursaĵoj, se ili pagas la afrankon (2 internaciaj respondkuponoj).

G. Mora

LA PLEJ VENDATA ESPERANTO-LIBRO

Ĝus aperis la 5-a eldono de la perfektiga antologia lerno- kaj lego-libro «PAŬOJ AL PLENA POSEDO» de la akademiano William Auld.

Eldone ĝis nun en, entute, pli ol 20.000 ekzempleroj, la menciita verko estas la plej sukcesa kaj la plej vendata Esperanto-libro en la tuta historio de la internacia lingvo.

En 230 paĝoj, la perfektiga lernolibro prezentas 30 lecionojn kun entute 180 lingvaj ekzercoj. Al ĉiu leciono estas aldonita literaturajo: entute, la studento trovas en la verko 18 originalajn kaj 12 tradukitajn beletrajn legaĵojn. La originalaj verkoj fontas el la plumo de la plej famaj Esperanto-stilistoj, de Zamenhof ĝis Kalocsay, Szilagy, k.a.

Dank'al kunlaboro kun Hungara Esperanto-Asocio, la nuna 5-a eldono aperas en 5.000 ekz., kaj estas vendata ankaŭ en la t.n. socialistaj landoj. «Heroldo de Esperanto» havas la solvendoraĵojn por la tuta mondo, escepte la t.n. socialistaj landoj.

A. Sikorska

La menciitan verkon oni povas jam mendi al Libro-Servo de H.E.F.

NOVA ESPERANTISTINO

La pasintan dimanĉon, 15-an de januaro, al nia karega amiko kaj semideano Antonio Macia Riquelme naskiĝis filineto, Carmen Belén, kiu faros la feliĉon de ŝiaj gepatroj kaj geavoj.

Nova denaska esperantistino por kiu ni deziras la plej grandan feliĉon kaj la okazon lerni Esperanton ne nur en ŝia domo, sed ankaŭ en ŝia lernejo.

De ĉi-tie ni gratulas la feliĉajn gepatrojn Macia-Soro kaj geavojn.

F. Z. R.

INTERNACIAJ KONGRESOJ KAJ KUNVENOJ

20-a INTERNACIA ESPERANTISTA FERIADO «La Pola Aŭtuno».

De la 1-a ĝis la 14-a de septembro 1984-a okazigos en la montara ripozloko Miedzygórze, en Sudety-montaro. La programo antaŭvidas konversaciajn kursojn, prelegserion pri Esperanto-movado kaj kulturan kaj distran programon, piedekskursojn, maskobalon k.t.p.

Partoprenkotizo: 175 usonaj dolaroj. Informoj riceveblaj de Pola Esperanto-Asocio; P.O. kesto 16; PL 50-952 WROCLAW 17 POLLANDO.

36-a IFEF-KONGRESO, okazonta en Slančev Brjag (BULGARIA) de la 12-a ĝis la 18-a de Majo 1984-a.

2-a ANDALUZA KONGRESO DE ESPERANTO, okazonta en Malago, de la 17-a ĝis la 19-a de Aŭgusto. La Provizora programo antaŭvidas: seminarion pri «La enkonduko de Esperanto en la lernejojn», ekzamenojn, teatraĵojn en esperanto kaj en hispana lingvoj, diskutrondojn k.t.p.

Estas rimarkinde ke oni havos dormejon senpagan por 25 personoj, kaj ke je 15-minuta piediro troviĝas la strando «Antonio Martín».

Petu klarigojn al: Dua Andaluza Kongreso de Esperanto; Trinidad Grund 28, 2º, MALAGA-1 (HISPANIO).

52-a INTERNACIA KONGRESO DE BLINDAJ ESPERANTISTOJ. Okazonta de la 21-a ĝis la 30-a de Junio en Tirrenia (Pisa) kaj en la kadro de la Festivalo de Itala Kulturo «Italujo: Kulturo kaj Naturo». Ĉu blindaj, ĉu vidantaj esperantistoj estas invitataj por kune ĝui ĉarman ripozlokon kaj profunde koni la italan kulturon.

18-a INTERNACIA KONFERENCO DE I.L.E.I. De la 14-a ĝis la 21-a de Aŭgusto okazigos en Skofja, Loka Slovenio (Jugoslavio). La temo de la Konferenco estas: «Esperanto, la alternativo en la sistemo de fremdlingva instruado». Petu informojn al la Hispana Sekciestro de I.L.E.I. S-ro Andrés Martín, Armen-gual de la Mota, 33; MALAGA.

20-a KATALUNA KONGRESO DE ESPERANTO. En Olot (Ĝirono) de la 12-a ĝis la 14-a de Oktobro okazigos la nunjara kataluna kongreso. Petu informojn al Kataluna Esperanto-Asocio, P.K. 290 SABADELL (Barcelona).

14-a AMIKECO-KONGRESO, de la 15-a ĝis la 21-a de Julio, okazonta en la arthistoria urbo Santiago de Compostela. Oni havas okazon partopreni en tiu Amikeco-Kongreso, sen paroladoj, aranĝita de s-ro Pierre Delaire, Direktoro de «Centre National Esperanto-Office», kaj travivi unu mirindan semajnon en Galegio, tute proksime de la maro, kun milda klimato. Ni vizitos la marbordon ekskursante postagmeze, kaj ni enprofundiĝos en la legendo kaj historio de Santiago de Compostela, fame konata en la mondo pro la amasaj pilgrimadoj, kaj pro la katedralo de la 11-a, 12-a kaj 13-a jarcentoj romana ĉefverko kun baroka fasado.

Oni gastos en la hotelo «Mi Aguila» (Mia Aglo) proks. 300 m-j de la Katedralo.

Fizika aliĝo: 77 francaj Fr.; Morala aliĝo, 50 F. Fr; Subtena aliĝo 100 F. Fr kaj esperantistoj malpli ol 15-jaraj, senpage.

Skribu tuj al: S-ro Pierre Delaire, Centre National E Office. Boite Postale 2002, 45010 ORLEANS (FRANCIO).



RECENZOJ RECENZOJ

KRONIKO EL LA HISTORIO DE «FRATECO» 1908-a-1983-a

Mendebila ĉe Libro-servo de H.E.F. Prezo: 250 pesetoj.

Jen belaspekta broŝuro en formato 22 x 15,5 cm., kun zorge kartonita bindaĵo, sur kiu prezentiĝas foto de la tri fondintoj de la societo FRATECO, en Zaragozo.

Kun kreskanta atento ni tralegis tiun kronikon, eldonitan la 22-an de julio 1983-a, okaze de la 43-a Hispana Kongreso de Esperanto, kiel omaĝon al la veteranoj de la Esperanta Societo FRATECO, en la jubileo de ĝia 75-jara datreveno.

La aŭtoro de tiu kroniko, nia aktiva lingvokolego, s-ro Antonio Marco Botella, ne nur tre objektive prezentas al la leganto la historion de la plej malnova Esperanto-societo nialanda, sed ankaŭ plurajn informojn pri pasintaj E-kongresoj, okazintaj antaŭ kaj post nia intercivitana milito.

Aparte emocia estas raporto pri la «internaidea» gastigado al aŭstraj infanoj, tiumpe suferantaj teruran mizeron kaj malsaton kaŭze de la unua Mondmilito. Efektive, la jaron 1920-an, per altruisma gastigado al tiuj infanoj, la hispanaj esperantistoj entuziasme realigis la mistikon de la Zamenhofa «Interna Ideo» de Esperanto, bazitan sur homamo, pacismo kaj internaciisma solidareco.

Resume, ĝi estas leginda libreto, ĉar tre interesa por ĉiu sciema esperantisto nialanda.

V. H. LI.

LA AVENTUROJ DE ŜPAR KAJ ALIA PORKETOJ

Verkis: Rik de Roover; Eldonis: Flandra Esperanto-Ligo (Antverpeno); ilustrita. Mendebila ĉe Libro-Servo de H.E.F., Apartado, 119 VALLADOLID (Hispanio). Prezo: 545 p-tojn.

H.E.F. havas pri ĉi-tiu verko la solan vendoraĵton en la Lando.

Jam en la Antaŭparolo, la verkinto klarigas du gravajn elementojn por la fina kompreno de la verko: ke temas pri verketo por dekjaraĝaj knaboj kaj ke laŭlonge de la rakontoj oni trovas pejzaĝojn, lokojn kaj morojn de la flandra ĉefurbo Antverpeno.

Certe, la leganto de la verko tuj konstatas tion, kaj sen problemoj, li enprofundiĝas en la rakonton pri la travivaĵoj de la Ŝparporketo, tio estas, la Ŝparmonujo, argila porko kun fendo kiun kutime uzas la infanojn por ŝpari monerojn.

La titolo estas iom longa, sed entute la libro estas interesa kaj bone presita, kaj preseraroj ne abundas.

La mencio, necesa por la rakonto, de multaj terminoj uzataj de la Katolika Eklezio estas klarigitaj je la fino de la libro.

Resume, tre taŭga libro por infanoj kaj geknaboj kiuj jam suface flue scias Esperanton; kvankam, la mallongaj frazoj kaj la facila kaj varia gramatikformo faras ĝin konvena por junaj komencantoj.

M. R. U.

VANKUVERO ATENDAS VIN



La kanadaj arbegoj donas unu el la ĉefaj fontoj de riĉeco al ĉi-tiu vastega Lando.

Se vi ankoraŭ ne vizitis **Vankuveron**, certe ravos vin la beleco de ĉi tiu gemo de la Pacifiko.

Kanado estas la dua plej granda lando en la mondo, kaj ĝia marbordo estas la plej longa de ajna lando. Krom la indiĝenaj civitanoj, indianoj kaj inuitoj (eski-moj) la kanadanoj devenas el la kvar anguloj de la mondo, sed precipe el Eŭropo kaj Azio.

La plej multo de la popolo loĝas en la suda parto de la lando. Ju pli norden oni veturas des malpli da homoj oni trovas, ĉar la klimato fariĝas plej severa kaj arbegoj superregas, kaj plej norde... eterna glacio kaj neĝo. Sed, feliĉe, la **69-a Universala Kongreso de Esperanto** okazos en la milda, suda parto de la plej okcidenta provinco de **Kanado**, **Brita Kolumbio** Malmultaj regionoj sur la tero proponas tiom da diverseco kaj natura beleco kiel la suda parto de Brita Kolumbio: Altegaj montoj, fekundaj kampoj, rokecaj fjordoj kaj sablaj Pacifikaj strandoj.

VANKUVERO la plej granda urbo de la provinco estas vigla centro de industrio, transporto kaj komunikado, kun grandega haveno, kaj tamen, unu el la plej belaj urboj de la mondo. Ĝia situo flanke de la Burard golfeto kun alrigardo al la krutaj marbordaj montoj estas senkompara, ĉar la golfeto estas sufiĉe profunda kaj la plej grandaj ŝipoj povas atingi la kernon de la urbo. Entute, estas bela loko tre taŭga por kongreso.

La multaj kongresaj aktivecoj ne lasos al la partoprenantoj multan liberan tempon, sed por tiuj kiuj ne emas sidi en la laborkunsidoj, oni aranĝos vizitojn al la vidindaĵoj en kaj ĉirkaŭ la urbo.

Certe rekomendinde estas veturo per kablotramo al la pinto de Grouse Monto. De la pinto je 1.250 metroj super la marnivelo, oni povas admiri belegan panoramon de Vankuvero kaj ĉirkaŭaĵoj. Oni povas vespermanĝi en bona restoracio ĉe la supro de la Monto kaj vidi la fabelan noktan spektaklon de la lumigita urbo.

La Universitato de Brita Kolumbio, kie okazos la kunveno de la Kongreso estas la unua Universitato de la provinco. Ĝi fondiĝis en 1908-a kaj komencis funkcii en 1915-a en provizoraj armeaj barakoj kun 379 studentoj. Ĝi transiris al la nuna loko, ĉe Kabo Grey en 1925-a kaj nun havas ĉ. 24.000 studentojn. Ĝia situo sur pitoreska promontaro estas laŭfame la plej bela Universitato-de la mondo.

La L.K.K. planas por vi multajn ekskursojn, per boato, aŭtobuso, funikularo, k.t.p. ekzistos mallongaj ekskursoj de 3 ĝis 6 horoj kaj neforgeseblaj estos la tuttagaj ekskursoj.

Unu plian fojon per Esperanto, ni havos eblecon koni alian parton de la mondo: la ravan kaj interesan landon **KANADO**-n.

(informoj ricevitaj de la L.K.K.-Vankuvero).

DEZIRAS KORESPONDI

Kun esperantistinoj kiuj interesiĝas pri muziko, filmo kaj sporto, 24 jaraĝa instruisto; s-ro Jozsef Baranyi; Kossuth u. 31, H-6.135 CSOLYOSPALOS (Hungario).

Pri diversaj temoj, 19 jaraĝa studentino; f-ino Elivira Mikita; Kiss János, u. 34 H 7.631 PECS (Hungario).

Junulo, 18 jaraĝa kun esperantistoj por interesanĝi bildkartojn kaj poŝtmarkojn; s-ro Medveczki Gábor; Ibolya u 9; H-4.027 DEBRECEN (Hungario).

21 Jaraĝa, universitata studento kun geesperantistoj pri literaturo, turismo, muziko kaj naturo; s-ro Hegyi Gyula; Lenin krt. 36-38, II lcs III. em. 2. H-6.720 SZEGED (Hungario).

SULKO

Ĝus aperis la N^o 19 de la Lerneja Esperanto-Revuo «SULKO» kiu estas ofsetpresita en Callosa de Segura (Alicante). La dekdu paĝa revueto enhavas interesajn artikoletojn kaj novaĵojn, ĉefe pri la E-agado aranĝata de la membroj de la hispana sekcio de I.L.E.I.

Se vi deziras apogi la laboron de niaj samideanoj de Callosa de Segura abonu la revueton «SULKO»-n. La jara kotizo kostas nur 350 p-tojn.

Sendu ilin al I.L.E.I. Colegio Público, Callosa de Segura (Alicante).

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO (U.E.A.)

Koresponda Servo Mondskala (K.S.M.)



1. Petanta korespondanto(j)n, bonvolu indiki vian nomon, adreson, aĝon, sekson, profesion, civilan staton, nombron da dezirataj korespondantoj, kaj de kiuj landoj kaj pri kiuj temoj.
2. Post kelkaj semajnoj vi ricevos de viaj novaj korespondantoj aŭ K.S.M. sendos al vi rekte adresojn de personoj, kun kiuj vi devas kontakti. Se post unu monato vi ankoraŭ ne ricevis leteron, avertu K.S.M., kiu sendos al vi novajn adresojn.
3. Ĉiufoje kiam vi petas korespondantojn de K.S.M., vi devas aldoni **2 INTERNACIAJN RESPONDKUPONOJN.**

Se vi deziras korespondanto(j)n de la tuta mondo, skribu al:

Koresponda Servo Mondskala (K.S.M.)
«Les Hortensias 2»
121 bis, Bv. Napoleón III
F-06200 NICE (Francio)



Gustumu la lastan verkaĵon de sciencfikcio kaj fantasto, SFEROJ - 3, kompilanto, M. G. Adúriz. Aĉetebla dum la 44a Hispana Kongreso de Esperanto en Seviljo. Prezo 600 pesetoj.